

Тарас Шевченко,  
Pensoj miaj, pensoj miaj

*tradukita de Konstantin Gusev*

Pensoj miaj, pensoj miaj,  
Ve kun tiaj, vere!  
Kial vi en sombraj vicoj  
Staras surpapere?  
Kiel vento vin ne blovis  
Polve en la stepon,  
Ne fordormis la malĝojo  
Kiel panjo bebon?

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....





Pensoj miaj, pensoj miaj,  
Filoj, floroj lastaj,  
Mi vin gardis, mi vin vartis  
En la kampoj vataj.  
Iru, filoj miaj, hejmen  
Al Ukrainio,  
Sed mi orfe en fremdujo  
Velkos je nenio.  
Hejme trovos vi amikajn  
Vortojn, bonan koron,  
Tie fine trovos veron  
Kaj eĉ, eble, gloron ...

Do, karesu, mia kara  
Tero Ukraina,  
Miajn filojn senprudentajn  
Per la man' patrina!

*Traduko de la ukraina poeto "Думи мої, думи мої" de Тарас Шевченко en Esperanton de KONSTANTIN GUSEV (†1980-11-09).*

*Arg-1116-2259 (2015-01-24 23:20:30)*

*Vidu ankaŭ: <http://homes.chass.utoronto.ca/~tarn/courses/468/Dumy-moi-comparison.pdf>.  
La melodio estas aŭdebla en <https://www.youtube.com/watch?v=NYECX8BR6nQ>.*